

Hector Hodler, 14-a parto : La Delegitaro
Claude Gacond, 357-a radioprelego, 1970.08.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- La pasintan semajnon ni provis montri, kial la gvidpovo en 1907 ne plu troviĝis en la manoj de Louis de Beaufront, sed grandparte en tiuj de la juna Hector Hodler.

Cl.- Hodiaŭ ni diros kelkajn vortojn pri la sinteno de Hector Hodler rilate al la delegitara afero.

A.- Por situigi la aferon ni unue citos erojn el front-artikolo de Hector Hodler publikigita la 27-an de oktobro 1907 en la gazeto *Esperanto* kaj titolita **Delegitaro por la alpreno de lingvo internacia**. Ili bone resumas la okazaĵojn.

Cl.- « *En ĉi tempo, kunvenas en Parizo la komitato elektita de la Delegitaro por la alpreno de Lingvo internacia ; ĝia decido, kia ajn ĝi estos, havos influon sur la estontan disvastiĝon de la ideo pri helpa lingvo. Tial ni opinias, ke la momento taŭgas por resumi la ĝisnunan historion de la Delegitaro, ĝian celon kaj signifon.*

A.- *La ideo pri la Delegitaro, daŭrigas Hector Hodler, estis naskita en la jaro 1900, dum la universala ekspozicio en Parizo. Laŭ la iniciato de S-roj D-roj Couturat kaj Leau, diversaj internaciaj kongresoj kaj sciencaj societoj, favore konsiderinte la ideon pri lingvo internacia, elektis delegitojn, kiuj, la 17-an de Januaro 1901, akceptis la jenan deklaron, kiu klare montras la celon kaj agadon de la Delegitaro por alpreno de lingvo internacia :*

Cl.- « *La subskribintoj, delegitaj de diversaj kongresoj aŭ Societoj por studi la problemon de helpa lingvo internacia, interkonsentis pri la punktoj sekvantaj :*

A.- *Estas dezirinde elekti kaj disvastigi unu helpan lingvon internacian, kiu, neniel anstataŭonte la naciajn idiomojn, en la vivado de ĉiu popolo servos por la skribaj kaj parolaj rilatoj inter diverslingvanoj.*

Cl.- *Helpa lingvo internacia, por plenumi sian celon, devas konformiĝi al la kondiĉoj sekvantaj :*

A.- *1-a kondiĉo.- Esti kapabla servi al la ordinaraj rilatoj de la socia vivado, al la komercaj interŝanĝoj kaj al la sciencaj kaj filozofiaj rilatoj.*

Cl.- *2-a kondiĉo.- Esti facile lernebla de ĉiu persono de meza elementa instruiteco kaj speciale de ĉiuj homoj de Eŭropa civilizacio.*

A.- *3-a kondiĉo.- Ne esti unu el la naciaj lingvoj.*

Cl.- *Estas taŭge organizi ĝeneralan Delegitaron, kiu reprezentos ĉiujn personojn, kiuj konsentas pri la neceseco kaj ebleco de helpa lingvo kaj estas interesataj pri ĝia uzo. Tiu Delegitaro elektos komitaton, kiu povos kunsidi dum certa tempo.*

A.- *La elekto de la helpa lingvo apartenas unue al la Internacia Asocio de la Akademioj, aŭ, en okazo de malsukceso, al la komitato priskribita. [...]*

Cl.- *La komitato kreos propagandan societon por disvastigi la uzadon de la helpa lingvo elektita. [...]* »

A.- Post tiu citaĵo Hector Hodler tiel daŭrigas sian artikolon : « *Tiu Deklaracio starigis firman planon de agado kaj formulis la praktikajn kondiĉojn, kiujn devas plenumi la estonta helpa*

lingvo. De 1900 ĝis 1907, post senbrua, sed tamen senlaca agado, la iniciatintoj de la Delegitaro kolektis aliĝojn de 307 diverslandaj societoj, kies multaj estas tre gravaj. [...]

Cl.- *Plie, la Delegitaro kolektis 1348 subskribojn de Akademianoj aŭ Universitataj profesoroj, kiuj bonvolis aprobi la [...] deklaron. En 1907 komenciĝis la klopodoj por ke la demando estu metata sur la tagordon de la kunveno de l' Internacia Asocio de l' Akademioj.*

A.- *Tiuj klopodoj ne tute sukcesis ; la 30-an de Majo, la Internacia Asocio de la Akademioj decidis ne akcepti tiun temon sur sian tagordon. [...] Ĝi konsideris, ke tia temo ne apartenas al ĝia kompetenteco. [...] Entute, la decido de la Akademioj signifas, ke la interesatoj mem devis elekti la taŭgan solvon, kaj por tio ĉi estis fondita la Delegitaro, kiu, laŭ la Deklaracio, devas mem elekti kompetentan komitaton. [...]*

Cl.- *Sekve de tio, la Delegitaro elektis dekkvarpersonan komitaton, kiu konsistas el diverslandaj eminentaj scienculoj. [...] La sekretarioj estas S-roj L. Leau kaj L. Couturat, el Parizo.*

A.- *La dirita komitato komencis kunveni en Parizo la 15-an de oktobro. »*

Cl.- *Tion do publikigis Hector Hodler la 27-an de oktobro, kaj li daŭrigas :*

A.- *« Ĝia definitiva decido estos baldaŭ konigata al la publiko. Laŭ la ĝenerala nuna impresio, la komitato principe akceptas Esperanton, sed proponante diversajn aldonojn kaj korektojn en la lingvo. »*

Cl.- *Kaj Hector Hodler konkludas : « Ni detenas nin de ĉia nuna komentario, ĝis la momento kiam la oficiala decido de la komitato estos publikigata kaj ĝia sintenado rilate al Esperanto precize konata. »*

A.- *Oni povas kompreni la senpaciencon de la tiamaj esperantistoj. Kio estos tiuj proponoj pri aldonoj kaj korektoj de esperanto ?*

Cl.- *En la gazeto Esperanto de la 27-a de novembro 1907, do unu monaton poste, ili povis legi, ke : « La Komitato [...] elektis Esperanton « pro ĝia relativa perfekteco kaj ĝiaj jam multaj praktikaj aplikaĵoj », sed kun propono de reformoj kaj korektoj, kiuj estos ekzamenataj de la kompetenta Esperantista aŭtoritato, tio estas de nia Lingva Komitato. [...] »*

A.- *En tiu front-artikolo titolita **Grava momento** Hector Hodler poste analizas la situacion. Jen la komenco de lia analizo :*

Cl.- *« Artefarita lingvo internacia estas la rezultato de libere akceptita interkonsento aŭ « kontrakto » inter ĝia elpensito kaj ĝiaj adeptoj ; tiu kontrakto anstataŭas la unuan mankantan tradicion kaj estas la nepre necesa fundamento, super kiu devas labori ĉiu uzanto de tiu lingvo por ebligi la iom-post-ioman kreiĝadon de vivanta tradicio, kiu garantios la lingvon kontraŭ ĉiuj arbitraj reformoj kaj personaj kapricoj. »*

A.- *Hector Hodler poste montras, ke se esperanto povis progresi, eviti skismojn, atingi prosperecon, eviti teoriajn diskutojn, estis dank'al la akceptado de komuna fundamento. Li poste montras, ke la sola evoluo ebla iras tra la vojo de la neologismoj kaj li sin prononcas kontraŭ ĉiuj arbitraj kaj a-prioriaj reformoj. Li konkludas, ke la momento estus oportuna por enkonduki tute nature, sen rompo, kelkajn aldonojn kaj korektojn, kiuj estus konformaj al la esencaj principoj de la lingvo kaj korekti kelkajn malbonaĵojn, kiuj per si mem estus kontraŭaj al la principoj de tiu Fundamento. Sed li donas nenian ekzemplon. Tiu laboro estas la tasko de la Lingva Komitato.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*

Hector Hodler, 14-a parto : La Delegitaro
Claude Gacond, 357-a radioprelego, 1970.08.12 & 15

-oOo-